

tempo

Gazeto de Kroata Esperanto-Ligo
Ĉasopis Hrvatskog saveza za esperanto

aprilo 2003




- ★ KEL aĉetis propran ejon en Vodnikova 9
- ★ 95 jaroj de Esperanto en Zagrebo
- ★ 6-a kongreso de kroataj esperantistoj
- ★ “Mirindaj aventuroj de metilernanto Hlapić” en la persa?
- ★ Kroata karavano al Gotenburgo
- ★ Nova libro pri Esperanto en la kroata

Karaj legantoj,

Kroata Esperanto-Ligo aĉetis propran ejon en Vodnikova 9. Ni bezonis por la investo 113.000 eŭrojn. La bazo de la investo en la nemoveblajon, kiu kuraĝigis nin eniri tiun plej grandan finanĉan projekton en la 95-jara historio de Esperanto en Zagrebo estis la kongresa gajno. La gajnon kreis nia komuna laboro dum la Universala Kongreso de Esperanto en 2001: ni ebligis la aĉeton de la ejo, ne nur per la sindediĉa laboro sed ankŭ per la pagado de kongresaj kotizoj.

Gravan helpon en la investo donis al ni Raiffeisenbanko en Zagrebo. Raiffeisen ebligis al ni la aĉeton per la kredito de 50.500 eŭroj. La krediton ni devus repagadi dum la venontaj 9 jaroj kaj nur post kiam ni elpagos la krediton la ejo apartenos al Kroata Esperanto-Ligo. La finanĉaj gvidantoj de la tuta projekto pri la nova esperantejo en Zagrebo estas Vjekoslav Morankiĉ kaj Spomenka Ŝtimec. La kreditkontrakton kun Raiffeisenbanko subskribis ankaŭ Boris Di Costanzo kiel kunŝuldanto nome de Esperanto-Societo Rijeka, kiu pro sia finanĉa forto tiel ebligis al KEL ricevon de la banka kredito.

Pluraj movadaj instancoj kaj amikoj ankaŭ subtenis nin per prunto, kiel ekzemple Masayuki Saionji.



Akademiano Dalibor Brozoviĉ, prezidanto de KEL, subskribis multajn dokumentojn en sia vivo. Jen la subskribo tre grava por Esperanto en Kroatio.

Ni planas repagadi la krediton ludonante la ejon de 83 kvadratmetroj en Vodnikova 9 kaj per la lupago elpigi la krediton.

Tio signifas, ke ni ne planas ŝanĝi niajn aktualajn adresojn: nia zagreba oficejo restos en Kneza Mislava 11 dum la zagrebaj kluboj daŭre aktivas en Amruŝeva 5.



Esperantista teamo Vjekoslav Morankiĉ, Dalibor Brozoviĉ, Boris Di Costanzo kun gesinjoroj Franceskoviĉ- loĝejvendintoj, Spomenka Ŝtimec kaj Nedeljko Korasiĉ antaŭ la banko.

Bankoficistino Marijana Sever kaj prezidanto de Esperanto-Societo Rijeka Boris Di Costanzo dum subskribo de la kreditdokumento.



Niaj membroj elkore subtenis la aĉeton, ne nur per voĉdonado dum la jarkunveno, sed ankaŭ per pagoj. Elkoran dankon al ĉiuj.

Inter la aliaj laboroj de la unua kvaronjaro en 2003, necesas akcenti, ke sukcesis la festo de 45-jara jubileo de Studenta Esperanto-Klubo. Krome, progresas la laboro pri la celebros de 95 jaroj de Esperanto en Zagrebo: la urbo disponigis al KEL la ejon Tribine grada Zagreba, Kaptol 27, por la solenaĵo la 31-an de majo 2003. La feston de la 95-a jubileo ni celebros per la 6-a kongreso de kroataj esperantistoj. La Alta Protektanto de la festo estas Prezidento de Kroatio Stjepan Meŝiĉ. La amika etoso daŭros dum du tagoj: post la zagreba laborsesio, ni estas invitataj partopreni en Kongresa Ekskurso al Lonjsko polje.

Bone progresas organizo de kroata karavano al Gotenburgo kiun prizorgas Faruk Islamoviĉ. Tridek personoj aliĝis.

Spomenka Ŝtimec

Tempo

Fondita en 1980. Ne aperis en militaj jaroj 1993 kaj 1994.
Aperas laŭeble kvarfoje jare - Jaro XXII, numero 1/2003
ISSN 0352-1583

Redakcio: Kneza Mislava 11/III,
HR-10000 Zagreb, Kroatio
tel: (385 1) 4617550, fakso (385 1) 4619373
rete: esperanto@zg.tel.hr
www.esperanto.hr

Tiu ĉi numero estas eldonita per helpo de Ministerio pri kulturo de Respubliko Kroatio.

Kontribuis: Mario Amadei, Lucija Borĉiĉ, Ivo Boroveĉki, Boris Di Costanzo, Danijela Drakula, Aĉtar Etemadi, Aldo de' Giorgi, Emil Hrvatin, Nedeljko Korasiĉ, Zlatko Hinŝt, Vesna Krmpotiĉ, Davor Klobuĉar, Vjekoslav Morankiĉ, Vanja Radovanoviĉ, Josip Pleadin, Mori Singo, Julia Sigmond, Draŝko Toplak, Dinka Ŝimuniĉ, Spomenka Ŝtimec

Redaktoris: Spomenka Ŝtimec

Grafike aranĝis: Josip Pleadin

Presis Grafokom, Đurdevac, grafokom@kc.hinet.hr
Anonctarifo 1/1 paĝo 1000 kn (135 EUR) 1/2 paĝo 500 kn (68 EUR),

Abono: 4 numeroj jare 40 kn (9,5 EUR)
unuopa numero 10 kn (1,5 EUR)

La redakcio ne respondecas pri la opinioj en la subskribitaj tekstoj.

KROATA ESPERANTO-LIGO AĈETIS PROPRAN EJON

*Jarkunveno de KEL dum kiu estis
akceptita la historia decido pri
investo en nemoveblaĵon.*

LISTO DE SUBTENANTOJ:

Helpis aĉeti la loĝejon en Vodnikova 9
pluraj esperantistoj al kiuj Kroata Esperanto-Ligo
elkore dankas:

1. Zlata Nanić	132,87 eurojn
2. Zlata Flego	67,76
3. Boris Čović	51,35
4. Jerko Baković	27,00
5. Karmen Crnković Vranko	27,00
6. Sava Matetić-Lučić	19,93
7. Dalibor Brozović	13,29
8. Tomislav Treer	13,29
9. Blaž Rocek	13,29
10. Marina Dimnjaković	13,29
11. Vida Jerman	13,29
12. Spomenka Štimec	13,29
13. Ante Biluš	6,64
14. Gordana Ivičić	6,64
15. Velimir Majdak	6,64
16. Dragan Barac	6,64
17. Kiota Esperanto-Societo	10,00
18. Dr. Franjo Šušković	13,29
19. Lucija Borčić	13,29
20. Dušan Davidović	13,29
21. Milan Sudec	2,70
22. anonima, HP 10126	13,20
23. anonima, HP 10161	13,20
24. anonima, HP10140	2,70
25. anonima, HP 10141	13,29
26. anonima, HP 10109	13,29
27. anonima, HP 10103	6,64
28. anonima	17,99
29. Mira Kocjančić	6,64
30. Ivo Puharić	13,29
31. anonima	27,00
32. Gordana Štrljic	6,70
33. Radenko Milošević	20,00
34. Danijela Drakula	13,29
35. Dinka Šimunić	13,29

Entute: 667,69

**Ĝis majo estis pagitaj entute 667,69
eŭroj! Tre koran dankon al ĉiuj!**

**Alvenis enpagoj de 10 personoj,
kies identeco ne estas konata.
Bonvolu sendi al ni kopion de la
enpagilo (uplatnice) porinforme!**



Fotis: J. Pleadin

NOVA LIBRO PRI ESPERANTO EN KROATIO

"ESPERANTSKI MOZAIK"

(Mozaiko de Esperanto)
La dua, plibonigita eldono
Aŭtoro: Davor Klobučar
Eldonas: Esperanto-Societo
"Liberiga Stelo" el Osijek
Presis: "Grafokom" Djurdjevac (Josip Pleadin)
Eldonkvanto: 500 ekzempleroj

KIO ĜI ESTAS?

- Nova libro pri Esperanto en la kroata lingvo.
- Ĝi informas pri la Esperanta movado kaj kulturo, pri la lingvo mem, kaj ankaŭ pri la Universala Kongreso de Esperanto en Zagreb 2001
- Bona kaj por komencantoj, kaj por multjaraj esperantistoj, kaj por instruistoj
- Informriĉa kaj interesa ankaŭ al ĝenerala publiko, kiu volas nur informiĝi pri Esperanto

KIAL ĜIN AĈETI?

- Tiom kvalitan libron **pri** Esperanto, en la nacia lingvo, ni en Kroatio delonge ne havis, kaj longe poste ni ne havos
- Ĝi povas esti tre grava verko en hejma biblioteko de ĉiu esperantisto, ĉar en unu libro troviĝas amaso da informoj pri la tuta Esperanta mondo, kulturo kaj lingvo
- Taŭga por instrui komencantojn, varbi novajn esperantistojn, montri al viaj amikoj la esperantan mondon, verki gazetajn artikolojn pri Esperanto ktp.
- Valora helpilo al Esperantaj instruistoj kiel plia helpilo pri la lingvo kaj gramatiko
- Memorigilo por ĝui denove la etoson de la zagreba UK, ĉar neniam ĝis nun iu UK estis priskribita tiom detale kaj vive!

KIAL AĈETI LA NOVAN LIBRON, SE VI JAM HAVAS LA MALNOVAN (2000.)?

- Ĝi havas 320 paĝojn (la unua eldono havis nur 115, kaj ĝi estis malpli granda)
- Ĉiuj tekstoj el la unua eldono estas korektitaj, ĝisdatigitaj aŭ pligrandigitaj
- Aperas novaj artikoloj, kaj eĉ kelkaj tute novaj ĉapitroj
- En la libro estas multaj ilustraĵoj kaj fotoj
- Kovrilpaĝo kaj kelkaj aliaj paĝoj estas koloraj
- La kovrilo estas fortike bindita

MESAĜO DE LA AŬTORO KAJ DE LA PRESISTO

- Tiu ĉi libro aperis, ĉar la aŭtoro (Davor Klobučar el Osijek) kaj la presisto (Josip Pleadin el Đurđevac) investis sian propran monon. Ĉiu el ili donis sumon de 2-3 mezaj monataj salajroj en Kroatio! Por kovri tiujn investojn, ĉiu el ili devas vendi pli ol 100 librojn. La aŭtoro bezonis ankaŭ 8 monatojn da laboro, kaj por tio verŝajne li ricevos neniun profiton!
- La aŭtoro kaj la presisto planas ankaŭ poste aliajn projektojn utilajn por Esperanto. Sed ĉiam ili devos riski

multe da mono. Aĉetinte la libron, vi montros, ke ekzistas Esperanta merkato en Kroatio, kaj tiel vi kuraĝigos kaj instigos ilin al la planitaj novaj projektoj!



EKZEMPLOJ EL LA LIBRO:

- En 150 artikoloj de "Mozaiko" vi povas ekzemple legi pri: parolado de Zamenhof en la unua UK, historio de Esperanto en Kroatio, unu labortago de Centra Oficejo de UEA, vojaĝo de Damir al Brazilo kaj al UK en Fortaleza, historio de Esperanto en Osijek, Rijeka, Split kaj Varaždin, agado de SEK, "Bude Borjan" kaj kroataj fervojistoj, pri la MoKoRo, Esperantaj studoj en San Marino, rok- kaj pop-muziko en Esperanto, pri ĉiuj gravaj atingoj de la Movado (Delegita Reto, Pasporta Servo...), pri la Esperanta literaturo kaj pri la plej konataj verkistoj, historio kaj signifo de Esperantaj simboloj, foruma diskuto en Interreto pri Esperanto...

- En la artikoloj Zamenhof rakontas pri apero de Esperanto, Claude Piron pri psikologiaj aspektoj de Esperanta movado kaj de la publiko, Joel Brozovsky pri tio kial li (usonano) uzas Esperanton, William Auld pri tio kial li dediĉas sin al Esperanto, akademiano Dalibor Brozović pri perspektivoj de Esperanto en la nova jarmilo...
- Se vi ŝatas legi librojn, vi trovos liston de 30 bonaj Esperantaj libroj kun informo pri ilia enhavo
- Ĉu vi ne ŝatus legi la antaŭparolon de nia pioniro Mavro Špicer al la unua kroata Esperanta libro (1908)? Aŭ la memorojn de Ivo Borovečki pri la UK en Zagreb 1953? Aŭ la preskaŭ perditan poetan tradukon de "La Espero" en la kroatan lingvon (Ante Ramljak)? Estas multaj valoraj antikvaĵoj en Mozaiko!

KION VI POVAS LEGI PRI LA ZAGREBA UK?

- Ekzemple, Vanja rakontas pri Junulara Programo, Ivana pri siaj spertoj en vendado de kongresaj ekskursoj, Joža skribis pri farado de kongresaj gazetoj, Damir pri sia laboro en la informejo, Davor pri gvidado de turista grupo en Dubrovnik, Željka pri organizado de helpantoj, Spomenka pri komplikaj laboroj por starigi Esperantan monumenton en Zagreb kaj por akiri subtenon de kroata prezidento Mesić, Franjo kaj Snježana pri multaj etaj okazaĵoj en la infana kongreseto, Judita priskribas organizadon de la Kongresa Balo, sed eĉ pli interesaj estas ŝiaj memoroj pri tio kiel Zagreb entute ricevis la Kongreson! Kaj Nikola rakontas sian historion kiel oficisto de UEA kaj samtempe kiel homo el Kroatio...
- Pri siaj spertoj rakontas ankaŭ partoprenantoj el aliaj landoj: Julia Sigmond el Rumanio, Aoyama Tooru el Japanio, Normand Fleury el Kanado, Garik Kokolija el Rusio, Matthias Behlert el Germanio, kaj pluraj aliaj homoj el Japanio, Rumanio kaj aliaj landoj...
- La libro prezentas parte ankaŭ rezultojn de la kongresa enketo: kion la partoprenantoj trovis bona, kaj kion malbona en la Kongreso, Zagreb kaj Kroatio...

KIEL ACETI LA LIBRON?

Pri la detaloj vidu la lastan kovrilpaĝon de ĉi-tiu numero de "Tempo".

MIRINDAJ AVENTUROJ DE METILERNANTO HLAPIĈ EN LA PERSA MANUSKRIPTO

El Teherano atingis nin bona novaĵo: Aktar Etemadi, konata irana esperantistino persigis la faman kroatan infanlibron **Mirindaj aventuroj de metilernanto Hlapiĉ**. La verko de Ivana Brlić - Mažuranić en Esperanta traduko de Maja Tišljar gajnis premion por Infanlibro de la jaro 1999. La Esperantan eldonon eblis presi dank' al la financa subteno de Ministerio pri Kulturo de Respubliko Kroatio.

Ne estas konate kiam kaj ĉe kiu eldonisto povus Hlapiĉ aperi en la persa. Longas la vojo de manuskripto ĝis libro.

Tio ne estas la unua traduko al la persa per Esperanto farita de Akter Etemadi. Ŝi persigis ankaŭ verkon de Miro Gavran **Amoj de Georgo Washington**. La verko bedaŭrinde ne trovis eldoniston. Aktar Etemadi publikigs en teherana revuo pri teatro **Namayesh** persan tradukon de la kroata dramo **La morto de Gogol** de Ulderiko Donadini, esperantigita por **Antologio de kroataj unuaktaj dramoj** de Klaus Dahmann kaj eldonita de KEL en 1997.




Ivana Brlić-Mažuranić

MIRINDAJ AVENTUROJ
DE METILERNANTO HLAPIĈ

ZAGREBA LERNOLIBRO EN LA RUMANA

Editura Grinta el Cluj-Napoca en Rumanio eldonis rumanan eldonon de la zagreba lernolibro pri Esperanto. La lernilon por komencantoj pri Esperanto, nomata "Zagreba Metodo" por rumanoj adaptis Ionel Onet. Post 9 kroataj eldonoj tio estas la 19-a lingvo en kiu la lernilo estas eldonita: angla, bulgara, Esperanta, germana, finna, franca, hungara, itala, japana, kataluna, kirunda, korea, makedona, malta, nederlanda, pola, portugala kaj slovena.

La aŭtoroj ricevis informon, ke aperis ankaŭ hispana, vjetnama kaj ukraina adaptaj de la sama lernolibro kaj petas eldonistojn sendi la koncernajn ekzemplerojn al la redakcio de "Tempo".



En Ruslando estas preparata la rusa eldono kaj en Makedonio la brajla eldono de la lernolibro.

La lernolibron aŭtoris Zlatko Tišljar, Spomenka Ŝtimec, Roger Imbert kaj Ivan Ŝpoljarec. La aŭtoro de la kanzonoj estas Johan Valono. Postparolon verkis Nikola Rašić.

NESENDITAJ LETEROJ EL JAPANIO EN KOMPAKTDISKO

Vojaĝpriskribo de 5000 km veturado tra Japanio, mendita por la sveda gazeto "Elektrikern" kiu havis 3 Esperantajn eldonojn, unu japanan kaj unu ĉinan, lastatempe aperis en kompaktdiska formo. **Nesenditaj leteroj el Japanio** tiel servos ĉefe por komencantoj de Kansaja Esperanto-Ligo, kiu eldonis ĝin. Kansaja Esperanto-Ligo renovigis la iamajn amatore faritajn kasedojn voĉlegitajn de la aŭtorino Spomenka Ŝtimec.



7.000 TAGOJ EN SIBERIO DE KARLO ŜTAJNER EKTRADUKATA EN LA JAPANAN KAJ ĈINAN

La verko de Karlo Ŝtajner **7000 tagojn en Siberio** por kiu Krešimir Barković en 2002 gajnis premion OSIEK por tradukado, lastatempe havas rimarkindajn sukcesojn en Azio. Kvankam la verko estis publikigita kun la permeso de la aŭtoro en la jaro 1983 ĉe Sennacieca Asocio Tutmonda, ĝi bezonis du jardekojn por veki intereson en Azio: konata japana tradukisto Kurisu Kei entreprenis la laboron de japanigo de la verko. La libro pri la teruraj krimoj kiujn Stalin faris je la nomo de la komunismo atingis ankaŭ Ĉinion. La laboron de ĉinigo de la verko entreprenas Shi Chengtai.

La ampleksa preskaŭ 500-paĝa verko bezonos multan paciencon de la tradukantoj al kiuj ni deziras paciencon kaj bonŝancon por trovi eldoniston.

ESPERANTISTINO ZLATA NANIĆ ELEKTITA INTER TRI PLEJ IDEALAJ VILAĜANINOJ

En la decembra numero de Tempo ni informis, ke knabino Stephanie Strunjak estis elektita por Zagrebanino de la jaro 2002 kaj ke ŝin akompanis Sava Matetić, fama en la kroata Esperantujo pro siaj diversaj aktivecoj. La sukcesoj de esperantistinoj ne ĉesas: Zlata Nanić, esperantistino kiu aktivas en la kroataj ekorondoj kaj en la lasta jaro aliris internacian publikon kiel aŭtorino de la libro **Manĝoj el sanigaj plantoj**, venkis en la konkurso de tagĵurnalo **Večernji list**. La konkurso celis elstarigi tri virinojn kiuj vivas en kroataj vilaĝoj kaj aktivas tie.

Zlata estras la bienon **Grajno** en la vilaĝo Habijanovac kie ŝi kreskigas diversajn sanigajn plantojn, klopodante pri tradiciaj manieroj de kreskigo sed aplikante ankaŭ modernajn postulojn de eko-agrikulturo. (Pluraj kongresanoj de la jaro 2001 ekskursis al ŝia bieno.)

En la konkurso de "Večernji list" Zlata estis elektita al la dua loko de Idela vilaĝanino de la jaro 2002. Sur la foto: Zlata Nanić en tradicia kostumo dum la elekto en vilaĝo Rakovec




REVUO FONTO POST DU JARDEKOJ FRUKTAS EN VELA LUKA

Vela Luka estas urbeto sur la insulo Korčula en departamento de Dubrovnik. La tiea eldonejo Matica Hrvatska eldonis humuraĵojn de la loka ĵurnalisto - humoristo Ivo Cetinić Paron.

La redaktoroj havis la ideon presi en la kolekto kun 28 humuraĵoj ankaŭ unusolan tradukitan tekston, tiun kiu en Esperanto aperis en la brazila "Fonto" sub la titolo de **Ĉu ni estas urbo aŭ vilaĝo?**

Notoj de insula poŝtisto aperis en Brazilo en la Esperanta traduko de Marinko Gjivoje. Marinko ja devenis de la insulo Korčula kaj multe kontribuis por diskonigi ĝin. La urbo Korčula ankaŭ hodiaŭ havas sian straton Marinko Gjivoje.

Pastro Ivan Oreb zorgis siatempe ke la aŭtoro ricevu sian verkon en Esperanta traduko kaj ĝi nun, post du jardekoj, reaperas.



NOVA DOKTORO EN NIAJ VICOJ

Zlatko Hinšt, membro de Kroata Fervojista Esperanto-Asocio, doktoriĝis la 13-an de decembro 2002 en Ekonomia fakultato de Zagrebo. (La zagreba fakultato kiun ornamas la skulptaĵo "La Futuro" de Jesper Neergaard.) "Prezroj kaj eksteraj efektoj kiel determiniloj de ekonomia pozicio de fervoja sistemo", la doktoriĝa laboro de Zlatko Hinšt esploras kiel antaŭenigi la fervojan sistemon en Kroatio. Elkoran gratulon!

D-ro VELIMIR PIŠKOREC KANDIDATAS POR KONGRESA UNIVERSITATO EN GOTENBURGO

En 2001 doktoriĝis en Filozofia fakultato nia membro Velimir Piškorec pri la temo "Germanismoj en dialekto de Podravina". Li tuj havis okazon aktivi kiel vic-rektoro de la zagreba UK. D-ro Velimir Piškorec nuntempe vicestras la fakon pri la germana lingvo kaj literaturo en Filozofia fakultato de Zagrebo. D-ro Piškorec kandidatas por prelegi en Kongresa Universitato en Gotenburgo.

STUDENTA ESPERANTO-KLUBO ZAGREB

FESTIS 45-JARAN JUBILEON

Studenta Esperanto-Klubo festis sian 45-an jubileon la 11-an de marto 2003. (Studenta Esperanto-Klubo estis fondita en la jaro 1957 kaj la efektiva jubileo pasis en 2002). Unika fenomeno en la historio de Esperanto-Movado: ja malmultaj studentaj rondoj kreas siajn tradiciojn en Esperantujo dum tiu zagreba survojas al sia duonjarcenta tradicio.

La aranĝon partoprenis pli ol 120 personoj kun la iamaj junuloj el la jaro 1957 kiuj fondis la organizon (Vjekoslav Morankić, la unua prezidanto, Nedeljko Korasić, Dragan Barac), surscenejiĝis ankaŭ la aktuala prezidantaro de SEK kun la lastatempe elektita prezidanto Dag Treer.

La festan aranĝon kompletigis plaĉa kaj bongusta koktelo de Zlata Nanić el ŝia libro "Manĝoj el sanigaj plantoj".


Ne mankis teatra etoso kun la aktuala teatraĵo de Vanja Radovanović **Instrukcioj pri la simpla vivo harmonie kun la naturo**, kiu estis prezentita je la 8-a fojo kaj en la multjara tradicio de Drama Grupo apartenas al la plej ofte ludata verko.

Ĉu troviĝos la homo kiu verkos kompletigon de 25 jaroj de Drama Grupo de Studenta Esperanto-Klubo kiun por la jubileo de SEK en 1985 preparis Zlatko Tišljar?

Honore al SEK ni publikigas la liston de ĉiuj prezidantoj de SEK de 1957 ĝis 2003.

Prezidantoj de SEK 1957-2003

1. 1957 Vjekoslav Morankić
2. 1958 Vjekoslav Morankić
3. 1959 Stanislav Radović
4. 1960 Dragutin Barac
5. 1961 Dragutin Barac
6. 1962 Nikola Valentić
7. 1963 Josip Brkanac
8. 1964 Josip Brkanac / Davor Doršić
9. 1965 Mladen Jovanović
10. 1966 Mladen Jovanović
11. 1967 Zlatko Tišljar
12. 1968 Zlatko Tišljar
13. 1969 Vesna Staničić
14. 1970 Mirko Jelkovic
15. 1971 Krunoslav Tišljar
16. 1972 Nikola Matijević
17. 1973 Krunoslav Tišljar
18. 1974 Slobodan Ostojić
19. 1975 Biserka Rožić
20. 1976 Srećko Kedveš
21. 1977 Ivica Špoljarec
22. 1978 Ljerka Rašo
23. 1979 Višnja Sudec
24. 1980 Vera Roknić
25. 1981 Vera Roknić
26. 1982 Vanja Esih
27. 1983 Vanda Bralić
28. 1984 Ankica Jagnjić
29. 1985 Vesna Kamenečki
30. 1986 Davor Štimec
31. 1987 Sanja Lazić
32. 1988 Sanja Lazić
33. 1989 Siniša Bronić
34. 1990 Vanja Radovanović
35. 1991 Miren Milović
36. 1992 Vesna Hitrec
37. 1993 Nataša Majer
38. 1994 Mea Bombardelli
39. 1995 Mea Bombardelli
40. 1996 Martina Prelogar
41. 1997 Faruk Islamović
42. 1998 Faruk Islamović
43. 1999 Irina Barac
44. 2000 Irina Barac
45. 2001 Gordan Muktić
46. 2002 Gordan Muktić
47. 2003 Dag Treer



95

JAROJ DE ESPERANTO EN ZAGREBO



Programo de la 6-a Kongreso de kroataj esperantistoj Zagreb

la 31-an de majo kaj la 1-an de junio 2003

Kongresejo:

Tribine Grada Zagreba, Kaptol 27

Alta protektanto:

Prezidanto de Respubliko Kroatio Stjepan Mesić
Urba estrarp de Zagrebo

Gazetara konferenco

Vendredon la 31-an de majo 10h00, Kneza Mislava 11

Provizora Kongresa programo:

La 31-an de majo

- 08h00 Malfermo de giĉetoj - Transdono de dokumentoj / ŝildoj
- 10h00 Malfermo / Himnoj - Saluto de la prezidanto Dalibor Brozović
- 10h30 Filmo pri KEL
Prelego "Rajto je lingvo", Andrej Korobejnikov
- 11h30 Koktelo
- 12h30 Kroataj poetinoj gastas ĉe esperantistoj
Prezento de *Antologio de kroataj poetinoj de la 20-a jarcento*
D-ro Dunja Detoni Dujmić, SpomenkaŠtimec, Vida Jerman
- 13h30 Kunsido de kroataj delegitoj - gvidas Josip Pleadin, ĉefdelegito por Kroatio
- 14h30 Paŭzo/ Lingvaj ekzercoj/ IKEF-kunsido en Amruševa
- 15h30 Esperanto-Mozaiko
- 15h30 Fino de la laborparto
- 16h30 Vizito al Vodnikova 9
- 20h00 Solena pianokonzerto de Andrej Korobejnikov en Glazbeni zavod, Gundulićeva 5

La 1-an de junio 2003

Kongresa ekskurso (nur por mendintoj) al Lonjsko polje, kiu startas je la 08h00 de Pošta 2, Branimirova

LOKA KONGRESA KOMITATO DE LA 6A KONGRESO DE KROATAJ ESPERANTISTOJ

- Prezidanto: **Dalibor Brozović**
- Sekretario: **Spomenka Štimec**
- Arta programo: **Spomenka Štimec
Vanja Radovanović**
- Gazetara servo: **Judita Rey
David Rey Hudeček
Darko Blažić**
- Kasisto: **Dinka Šimunić**
- Kongreslibro: **Radenko Milošević**
- Giĉetoj, dokumentoj: **Bojana Đuričić**
- Teknika servo: **Darko Blažić
David Rey Hudeček**
- Kongresa ekskurso: **Faruk Islamović**
- Laborprogramo: **Josip Pleadin**
- Gvidanto al Vodnikova: **Nedeljko Korasić**
- Fotoservo: **Draško Toplak**



Sur la foto kun Kep Enderby kaj Spomenka Štimec: la aktuala urbestrino de Zagreb Vlasta Pavić akceptis en 2001, dum ŝi estis vicurbestrino, kongresanojn dum la kongreso. Fotis Mario Amadei.

N. Hohlov

LA TAJDO**NIKOLAO HOHLOV EN
KROATA BIOGRAFIA
LEKSIKONO**

En 2003 aperis volumo H de Kroata Biografia Leksikono en Zagrebo. Ĝi estas grava por esperantistoj ĉar ĝi enhavas enhavas informojn pri Esperanta poeto **Nikolao Ivanoviĉ Hohlov**. Poeto, tradukisto, dramisto, kiu vivis en Zagrebo de 1920 ĝis 1928 kaj parte tie kreis sian plej faman poemaron "**La tajdo**" kun la bela poemo "**Vintra fabelo**". En Zagrebo li verkis ankaŭ sian komedieton "**La morto de delegito de UEA**", prezentitan en Zagrebo la 5-an de januaro 1924 kaj dum UK en Vieno en 1924.

**MATE BALOTA EN
ESPERANTO**

Universitata Biblioteko en Pula estis organizanto en Malnova urbodomo de ekspozicio pri Mate Balota, fama istria poeto. Okaze de la fermo de la programo la 15-an de marto 2003 D-ro Ivo Boroveĉki prezentis Esperantajn tradukojn de Balota, interalie la popularan, en la ĉakava dialekto verkitan poemon "**Kaprino**". Paralele al Esperanta li prezentis anglan kaj germanan tradukojn de "Kaprino" (kiu cetere per Esperanto estis tradukita ankaŭ al la islanda de Baldur Ragnarsson, al la albana kaj turka de Džemal Bajraktari kaj al la ĉina de Li Shijun).

MKR OKAZOS EN KROATIO

Ĉi-jara MKR okazos en Kroatio, en vilaĝo Tuk apud Mrkopalj, kiu troviĝas meze de la regiono Gorski Kotar, proksimume 50 km nordoriente de Rijeka kaj 150 km sudokcidente de Zagreb. Tuk kaj Mrkopalj estas tradiciaj vilaĝoj kiuj troviĝas en romantika valo proksime al du naturparkoj, Bijeje Stijene ("blankaj rokoj") kaj Samarske Stijene, kaj proksime al la plej alta pinto de Gorski Kotar, Bjelolasica (1534 m).

La renkontiĝo okazos kiel kutime, fine de septembro: de la 25-a ĝis la 28-a de septembro 2003.

Ĉiujn aliajn informojn (kaj kelkajn bildojn de la vizitota regiono) kaj la aliĝilon trovu je jam konata MKR-retpaĝo (<http://www.angelfire.com/va2/Vanja> i <http://www.angelfire.com/va2/Vanja>

NOVA PREZIDANTARO DE SEK KAJ KEJA

Studenta Esperanto-Klubo elektis novan prezidantaron la 31-an de januaro 2003. Prezidanto: Dag Tree; sekretario: Branka Brajko; kasisto: Daša Filipčić. Membroj: Ozren Ĉuk, Josip Ferenčić, Sonja Kovač kaj Ema Pap.

SEK havas du permanentajn membrojn en Jarkunveno de KEL: Tomislav Divjak kaj Ema Pap.

Kroata Esperanto-Junulara Asocio ricevis la jenan estraron: prezidanto: Dag Treer; sekretario: Branka Brajko, kasisto Tonina Novak. Membroj: Ozren Ĉuk, Josip Ferenčić, Sonja Kovač kaj Ema Pap. Membroj de Jarkunveno de KEL por KEJA estas Ozren Ĉuk kaj Josip Ferenčić.

NOVA TEATRAĴO DE SEK

"Ĉiuj koloroj de ĉielarko" estas la titolo de la nova teatraĵo de SEK, kiun aŭtoras Vanja Radovanović (aŭtoro de teksto kaj reĝisoro). La kroata versio de la teksto estis publike prezentita la 3-an de aprilo en Centar za kulturu Peščenica en Zagrebo kadre de renkontiĝo de zagrebaj teatraĵ amatoroj por la jaro 2003, kiel unu el 42 amatoraj teatraĵoj por la jaro 2003. Rolis Dag Treer, Sonia Savora, Vladimir Dujnić, Vanja Radovanović kaj Tomislav Divjak. La Esperantan version SEK planas prezenti dum la IJK en Svedio.

**REEĤOJ PRI LA PREMIITA FABELO
DE STEPHANIE STRUNJAK**

Post kiam la fabelo de Stephanie Strunjak "**Kiel formikbebo savis formikejon kaj konatiĝis kun Avo Frosto**" estis publikigita en Tempo ĝi ricevis ankaŭ sian anglan tradukon de Nina Ferić publikigita en la revuo "**Most /The Bridge**", revuo por internaciaj literaturaj rilatoj, marto 2003. La traduko estas akompanata per la intervjuo de Stephanie.

Ankaŭ la revuo "**Profil akademija**" de decembro 2002 publikigis longan intervjuon kun Stephanie. El Finnlando atingis nin gazeto **Kaleva** de la 28a de decembro 2002, kiu informas pri Stephanie kaj ŝia fabelo.

KALEVA



DIPLOMVERKO PRI ESPERANTA TEMO EN KROATIO

Danijela Drakula (1974) diplomiĝis pri psikologio la 9-an de aprilo 2003 en Filozofia fakultato en Zagrebo per diplomverko el la kampo de soacia psikologio kies resumon ni prezentas ĉi-sube.

Tio estas la unua diplomverko pri Esperanto en psikologio en Kroatio. Korajn gratulojn de la redakcio.

APLIKO DE TEORIO DE REZONA AGADO EN PROGNOZO DE ENGAĜIĜO POR ESPERANTO

La aŭtorino de tiu ĉi verko deziras elkore danki al ĉiuj esperantistoj kiuj per sia grandanima helpo (konsilante, informante, pruntante literaturon, kunhelpante en la ekzamenado de partoprenantoj, sinofereme kaj fruktodone kolektante subskribojn, partoprenante en pluraj manieroj) ebligis evoluon de sciencsplora laboro en Esperantujo !

Ĉefa celo de esplorado estis per la baza modelo de rezona agado ekzameni prognozeblecon de engaĝiĝo por Esperanto en la sampla de esperantistoj. Modelekzamenado estas farita en la sampla de 125 partoprenantoj, ambaŭ-seksaj, aĝaj de 15-84 jaroj. Ĉefe ili estas ekzamenitaj en Zagrebo, en kadre de laborkunvenoj kaj klubaj kunvenoj de esperantistoj, kaj aliajn esperantistojn oni ekzamenis en kelkaj aliaj kroataj urboj (Durdevac, Osijek, Rijeka, Varaždin). Estas aplikita demandilo "Esperanto - 2001" konstruita por la bezonoj de tiu ĉi esploro. Ene de ĝi troviĝas skalo de sintenoj por disvastigado de Esperanto ellaborita dum la antaŭa helpesplorado en la sampla de 49 studentoj de psikologio kaj 21 esperantistoj.

Rezultoj montris ke: (1) Esperantistoj havas altajn pozitivajn sintenojn al disvastigado de Esperanto kiel estis atendita; sed ankaŭ ke ili estas specife sentemaj al la demandoj rilatantaj enkondukon de Esperanto en la strukturo de EU; (2) Esperantistoj perceptas malgrandan socian subtenon de la ĉirkaŭaĵo en disvastigado de Esperanto kiel estis atendita; E-komunumo kiel unu el relevantaj referencoj por subteni agadon por Esperanto havas plej grandajn atendojn rilate al la disvastigado de Esperanto, sed la komunumanoj ne havas proporcie altan motivacion por kontentigi tiujn atendojn; (3) Ekzamenado de prognozebleco por disvastigado de Esperanto sur la bazo de la modelo de rezona agado estas farita rilate al tri kondutoj: subskribo de peticio, kolektado de peticiaj subskriboj kaj elekto de la numero de subskriboj. Konsiderante malaltan diskriminecon de la mezuroj kondukinteco kaj konduto, propra subskribo ne estas analizita per la modelo. Akiritaj rezultoj kongruas kun la modelo kiam temas pri la ekzamenado de mediatora rolo de la kondukinteco por la influo de la sinteno al la konduto. Perata influo de (subjektiva socia) normo al la konduto ne estas konfirmita pro la nesignifeco de normo en la prognozado de rekodita kondukinteco kaj en la prognozado de subskribnumero-elekto. Ankaŭ estas konstatita malforta prognozebleco de subskribkolektado. Starigis demando pri la ĝusteco uzi peticion ĉe prognozado de engaĝiĝo por disvastigado de Esperanto.

Kelkaj karakterizoj de Esperanto-komunumo

Ok variabloj¹ estas analizitaj en kompleta sampla de 141 esperantistoj, inter kiuj kvar demografiaj (sekso, aĝo, profesio kaj eduko) kaj kvar temantaj pri esperantisteco (motivaĵo por okupiĝi pri Esperanto, aktiveco en tiu okupado, fonto kaj jaro de la ekscio pri Esperanto). Kurte montritaj, rezultoj estas jenaj:

Partoprenantoj estas dividitaj en tri aĝo-grupoj: 'pli juna' (47.5%), 'meza' (36.9%), 'pli maljuna' (15.6%). Laŭ la sekso, nesignife dominas kvanto de virinoj (56%). Aĝ- kaj seks- strukturoj similas al la esplorzultoj en iamaj socialismaj landoj².

En la fina analizpunkto pri motivaĵo, ĝi estas dividita en du grupoj: idealismaj kaj praktikaj motivoj por okupiĝi pri Esperanto. Praktikaj motivoj superas idealismajn (per du trionoj da partoprenantoj) kiel en la plej multo de aliaj analizoj. Laŭ la aktiveco, po proksimume unu triono da partoprenantoj formas grupojn: "komencantoj" kaj "averaĝe aktivaj", kaj po unu sesono grupojn: "antaŭe aktivaj" kaj "aktivuloj".

Fonto de la ekscio pri Esperanto estas rekodita en du ĉefaj grupoj: rektaj (amiko, parenco, kolego ĉe la laborloko aŭ en la lernejo, profesoro) kaj malrektaj (gazeta artikolo, TV, radio, Interreto, faldfolio, broŝuro kaj alia reklamliteraturo).

Sendepende de la aĝo aŭ la sekso de partoprenantoj, superas rektaj fontoj. Samajn rezultojn liveras analizo de variabla jaro de la ekscio pri Esperanto - en ĉiuj tempoperiodoj superas rektaj sur la malrektaj fontoj, malgraŭ la evoluo de teknologio kaj eta reklamforto de disvastigado de Esperanto pere de persona kontakto.

Profesio - dominas grupo de labore neaktivaj partoprenantoj - studentoj, kaj poste pensiuloj. Ilin sekvas grupo de laboraktivaj partoprenantoj 'profesoro, asistanto, instruisto'. Supozante ke en tiu grupo la plej oftas tiuj kiuj prelegas, oni povas konstati ke rezultoj kongruas kun antaŭaj esploroj. Pri edukiteco de partoprenantoj oni konkludis pere de variabla profesio (tio eblis por pli ol 85% da ekzamenitoj). Minimume 34 procentoj estas altedukitaj, t.s. pli edukitaj ol averaĝaj kroatoj (nur 7.8% en la jaro 2001). Rezultoj kongruas kun la komparoj inter esperantistoj kaj naciaj averaĝoj en aliaj landoj - Britio, Finnlando, Germanio.

Danijela Drakula

¹ Tiu ĉi parto de la esploro ne apartenas al la diplomverko, sed estas farita okaze de la rara ebleco ekzameni samplon de esperantistoj, kaj pli enhavas sociologiajn ol psikologiajn trajtojn.

² La socian strukturon de la lando kaj esplorzultoj oni devus analizi el la pli vasta, sociologia perspektivo kio transiras eblecojn de tiu ĉi verko.

NI INSTRUAS (daŭrigo el 2002)

Varaždin

Dački dom
Instruas Janja Kelava
Marde

Janja Kelava instruas en aparta progresiga kurso plian lernanton.


Slavonski Brod

Elementa lernejo "Antun Mihanović"
Instruas Nela Dončević

Rijeka

Progresiga kurso
Instruas Vladimir Margan
Jaŭde je la 18h00

Familia kurso en Familio Petelin
Gvidas Boris Di Costanzo



Parto de Esperanto-kurso en societejo de Rijeka dum decembro 2002.

Lernanto Toni
en Elementa lernejo "Mato Lovrak"



Zagreb

Studenta Esperanto-Klubo
Kurso por komencantoj
Gvidas Ozren Ĉuk

Kurso por progresantoj
Gvidas Vladimir Dujnić

Esperanto-Societo "Bude Borjan"
Kurso por komencantoj
Gvidas Gordana Jurina

Kurso por postkomencantoj
Gvidas Gordana Jurina

Kurso por progresintoj
"Vojaĝo en Esperanto-Lando"
Gvidas Spomenka Štimatec

JARKUNVENO 2003 KAJ KROATA ILEI-SEKCIO

Post la Jarkunveno de Kroata Esperanto-Ligo kiu okazis la 8-an de februaro 2003 kaj kiu rezultis interalie per decido pri aĉeto de la loĝejo en Vodnikova 9, ankaŭ Kroata ILEI-sekcio kunsidis. La instruistoj traktis precipe la jaran konkurson de lernantoj en Esperanto-scio kiu okazos en Kostrena de la 23-a ĝis la 25-a de majo 2003. Por la nova sekretario estis elektita Ida Bogadi el lernejo **Gustava Krkleca Zagreb**. Ankica Jagnjić daŭre prezidas la sektion. **Lernejo Mladost** kun instruistino Marija Jerković transprenis la zorgon pri la kroata partopreno en la projekto **Interkulturo**. Sian duan ĉi-jaran kunsidon la ILEI-sekcio havis la 5-an de aprilo 2003 kaj esploris la eblecon pri eventuala partoprenigo de Jelena Lončarević el **Lernejo Mate Lovraka Zagreb** en ILEI-seminario en Orestrand en Svedio.



STRATO DE RAJKA BAKOVIĆ EN BOLIVIO

Esperanto-Societo "Bude Borjan" inter siaj merkedaj aktivecoj okazigis renkontiĝon kun Jerko Baković, la 27-an de marto 2003. Li prezentis la vivon de siaj du fratinoj Zdenka Baković kaj Rajka Baković, kiuj ambaŭ martire mortis en decembro 1941. La prelego donis la okazon refreŝigi la memorojn pri kontraŭfaŝisma aktivado de esperantistoj (en la iama Jugoslavio ja 90 da ili estis proklamitaj popolaj herooj, Rajka estis unu el ili.).

Zdenka mortis unu tagon pli frue ol Rajka per salto de la tria etaĝo el la ustaŝa policejo, proksime de la loko kie nun troviĝas la ejo de Kroata Esperanto-Ligo en Kneza Miŝlava. Rajka kaj Zdenka (1917) naskiĝis en Bolivio, kie la gepatroj Baković elmigris kaj posedis vendejon. La familio revenis al Kroatio en la tridekaj jaroj kaj ekrilatis interalie al Esperantaj rondoj. La urbo Oruro en Bolivio omaĝis al sia filino Rajka Baković nominte per ŝia nomo la straton kie troviĝis la domo de la familio Baković.



Sur la foto: Strato de Rajka Baković en Oruro, fotita de David Rey en 1984.

MASAYUKI SAIONJI INSTRUIS YUMEIHO-TERAPION

Yumeiho-Terapio trovis siajn adeptojn en Kroatio. Masayuki Saionji, la aŭtoro de la terapio instruis al komencantoj kaj progresintoj de al 4-a ĝis la 7-a de aprilo 2003. Tri personoj ekzameniĝis pri la dua grado de Yumeiho-terapio, unu akiris la trian kaj deko lernis pri enkonduko al la terapio.

La restado de Masayuki Saionji en Kroatio rezultis per televida elsendo kaj du artikoloj en "Arena" kaj "Novi list".

HELPO DE ĜEMELA URBO POR LA AĈETO DE LA EJO

La aĉeto de propra ejo havis reehon ankaŭ ekster la landa movado. Kiota Esperanto-Societo, Kiota filio de Japana Esperanto-Instituto enpagis 10,00 eŭrojn. Koran dankon!

ESPERANTO PREZENTITA AL GIMNAZIANOJ

La 16-an de aprilo en Gimnazio de d-ro Ivan Kranjčev en Đurđevac, al dekkvino da gimnazianoj estis prezentita internacia lingvo Esperanto, ĝia ekesto, funkciado de ĝia parolkomunumo kaj per unua leciono laŭ la Zagreba metodo ili ankaŭ eklernis la lingvon mem, por tuj povi diskuti la asertojn pri facileco de Esperanto. Evoluis ankaŭ diskuto pri utileco ŝanĝi lernadon de la latina al lernado de Esperanto, pro deveno de la Esperantaj radikoj el la latina. La laborgrupo gvidita de profesoro Zdravko Seleš finiĝis per Esperanta muziko, trarigardo de Esperanta literaturo kaj parkerigo de Esperantaj vortoj per memorludo. Kelkaj lernantoj montris intereson organizi en la sekvonta lernoĵaro kurson de Esperanto, ĉar dum pasintaj du jaroj pro pluraj kaŭzoj ĝi ne povis okazi.

MUZEO MIMARA GASTIGOS NEERGAARD

Kroata Esperanto-Ligo ricevis subvencion de la urbo Zagrebo por aranĝi ekspozicion de dana skulptisto Jesper Neergaard en Muzeo Mimara en septembro 2003. La skulptisto kiu donacis sian skulptaĵon "La Futuro" al la urbo dum la Universala Kongreso 2001 volonte revenos al Zagrebo.

La urba subvencio estas ĉ. 4000 eŭroj. Neergaard ekspozicios siajn ĉambrajn skulptaĵojn diference de la parka skulptaĵo kiu pezas ĉ. 6 tunojn. Esperantistoj traktas kun la urbo Osijek pri la eventuala gastado de la sama ekspozicio ankaŭ en Osijek.

KROATA KARAVANO AL UNIVERSALA KONGRESO EN GOTENBURGO

Al la kroata aŭtobusa karavano al Gotenburgo, kiun organizas KEL, aliĝis pli ol 30 personoj (plia deko flugos al la kongresurbo). La respondeculo pri la vojaĝo, Faruk Islamović proponis vere allogan itineron kiu ampleksas interalie ankaŭ survojan viziton al Kopenhago, respektive Berlino kaj Prago dum la reveno. La dumkongresa ekskurso gvidos al Oslo.

Bedaŭrinde la eŭropaj leĝoj malhelpas ke en la buso kunveturu ankaŭ alilandaj esperantistoj.

Cetere, la vojaĝagantejo, kiu transportos kongresanojn estas Generalturist, la agentejo de UK 2001, kiu ankaŭ post la kongreso vivas sur la titolpaĝo de "Vojaĝo en Esperanto-Lando".

S. Štimec

OLIVARBOJ DE AMIKECO EN ISTRIO

Dekok esperantistoj el Rijeka iris en Kaštelir apud Poreč, renkonti gesamideanojn el Istrio kaj Italio, dimanĉon, la 23-an de marto 2003. En granda korto atendis nin multaj gesamideanoj kaj nia gastiganto. Sur tablo brando kaj olivplantoj.

Marcello Trampuh, membro de Esperanto-Societo Rijeka, decidis gastigi esperantistojn en sia bieno kiel inicianto kaj organizanto de internacia renkontiĝo "Plantado de Olivarboj".

Kvindek partoprenantoj ĝuis belan fruprintempan tagon. Post kafumado sekvis laboro. Ĉi-jare plantitaj estas jenaj arboj:

Olivarbo GERMANIO estas plantita de gesinjoroj Schreiben kaj Leite, ITALIO de Edvige Ackermann, KROATIO de s-ro Vjekoslav Morankić kaj Rumanio de s-ino Afrodita Cionckin.

Prezidanto de Esperanto-

societo Rijeka Boris di Costanzo plantis arbon de Rijeka, dum Marcello Trampuh plantis arbon por Kawasaki, ĝemelurbo de Rijeka.

Pasis trankvila, senstreĉa tago. Je adiaŭo la partoprenantoj ricevis po botelon da vino. Antaŭ vespero ni forlasis afablajn gastigantojn, samideanojn kaj belan Istrion. Ĉi-jara plantado ne estis unua. En printempo 2002 la aranĝo komenciĝis. En la jaro 2000 s-ro Marcello Trampuh ricevis premion "Ideja Istra 2000" de Turistiĉka zajednica istarske županije por la ideo kiel valorigi olivarbon en turismo.

Evidente Trampuh scias kiel agi en turismo, kaj ankaŭ en la movado. Fotojn pri la aranĝo vi povas trovi en la retpaĝo: <http://kastelir.hr-free.com/olivarboj2.htm>

Emil Hrvatin

POKALO KOSTRENA 2003 KAJ EŬROPA RENKONTIĜO DE LERNANTOJ

Esperanto-Domo en Kostrena atendas siajn junajn gastojn, lernantojn pri Esperanto, kiuj konkurencos por pokalo Kostrena 2003. Jam aliĝis lernejoj el Matulji kaj la zagrebaj lernejoj Mladost, Gustava Krkleca, Mate Lovraka, samkiel pluraj individuaj lernantoj el Zagrebo. La ĉefa konkurso okazos de la 25a ĝis la 25a de majo 2003. Paralele okazas ankaŭ Eŭropa Renkontiĝo de lernantoj. Ili ne konkuras por la premio Kostrena, sed estas bonvenaj ĝui la etoson. Granda parto de la renkontiĝo estas dediĉita al banado en Adriatiko.

Fabriko de transportiloj el Zagrebo aŭspicias la aranĝon. La ĉeforganizanto estas Esperanto-Societo Rijeka kaj la respondeculo estas Emil Hrvatin.

SEMAJNO DE INTERNACIA AMIKECO EN TRIESTO

Inspirita per kroata aranĝo **Mezeŭropo estas mia hejmo** Triesta Esperanto-Asocio omaĝe al la 35-a Semajno de Internacia Amikeco okazigis samteman aranĝon de la 17-a ĝis la 23-a de februaro 2003, en kiu flanke de la kroatoj kontribuis Spomenka Štimec. La ĉeforganizanto Edvige Ackerman-Tantin okazigis renkontiĝon en la Kroata Konsulejo kun la kroata konsulo Vjekoslav Tomažić por informi lin pri kroata-Esperanta kunlaboro.

SVEDA AKADEMIO POST LA KROATA AKADEMIO SUBTENAS ESPERANTAN AKADEMION

La Sveda Akademio decidis finance apogi la Simpozion pri Interkultura Komunikado kiu okazos kadre de UK en Gotenburgo. La subvencio korespondas al ĉ. 4300 eŭroj. Post kiam la Kroata Akademio subtenis la okazigon de Simpozio de Esperanta Akademio en Zagrebo per senpaga disponigo de sia ejo por la prelegaro en 2001, jen iu plia nacia akademio subtenas la laboron de la Esperanta Akademio. La faman Svedan Akademion fondis en 1787 la reĝo Gustavo III. La simpozio okazos en Gotenburga Universitato la 2-an kaj 3-an de aŭgusto 2003. En la simpozio prelegos ok prestiĝaj profesoroj kaj unu el la prelegoj tuŝas nian lingvan mondon: Jouko Lindstedt, profesoro pri slavaj lingvoj kaj membro de la Akademio de Esperanto prelegos pri Interlingva komunikado sen interlingvo: la balkania modelo. Same kiel en 2001 la ĉeforganizanto de la simpozio nome de la Esperanta Akademio estas Christer Kiselman.



NI FUNEBRAS

Anka Franĉić

Membrino de Esperanto-Societo Rijeka forpasis en Rijeka la 27-an de januaro 2003. Ŝi naskiĝis en Rijeka la 22-an de februaro 1911. Finis ekonomian mezlernejon kaj laboris profesie kiel ekonomiisto kaj oficistino ĝis kiam ŝi pensiigis. Esperantistiĝis en la jaro 1931 en Rijeka, lernante la lingvon de sia patro Ante Franĉić. Ŝi membris en Esperanto-societo Rijeka ekde la jaro 1946. Plurfoje estis membo de la gvidorganoj de la societo en Rijeka (membro de la komitato, kasistino aŭ membro de kontrolkomitato).

Paolo Ficiur

Membro de Esperanto-societo Rijeka forpasis la 16-an de januaro 2003 en Rijeka. Li naskiĝis la 24-an de junio 1932 en Rijeka. Laŭprofesie li estis teknikisto-preciza mekanikisto kaj laboris en Distilejo de mineralaj oleoj (Rafinerija nafte) Rijeka. Esperantistiĝis en la jaro 1948 en Rijeka. Dum la kvindekaj kaj sesdekaj jaroj estis plurfoje komitatano de Esperanto-societo Rijeka. Aktivis ankaŭ en Unuiĝo de italoj Rijeka (Comunita degli italiani di Fiume).

Sinceran konfdolencon ni esprimas al la familianoj de la forpasintaj membron de Esperanto-societo Rijeka.

RECENZO



JOSIP PLEADIN: BIOGRAFIA LEKSIKONO DE KROATIAJ ESPERANTISTOJ

Eldoninto: Grafokom, Đurđevac, 2002, 179 p.,
Formato: 24,5 cm x 17,5 cm

Tiu ĉi grafike plaĉa libro kun firmaj helverdaj kovriloj estas verkita, kompostita kaj presita far elstara kroata esperantisto, tradukanto kaj profesia grafikisto Josip Pleadin. Lian diligentan dujaran esploron, informserĉadon kaj

kroata Esperanto-Movado. Ni legas biografiojn de simplaj homoj, laboristoj, vilaĝanoj, lernantoj, kaj same de diversfakaj metiistoj, oficistoj, ĝis la biografioj de tre multaj studentoj, profesoroj, juristoj, ekonomikistoj, universitataj profesoroj kaj eĉ akademianoj.

Estas nepre rimarkinde ke en nialanda movado aktivis tre multaj kontraŭfaŝistoj. Dum la dua mondmilito multaj kroataj esperantistoj partoprenis kiel partizanaj batalantoj en la Popolliberiga milito, kelkdekoj pereis batalkampe, sed ankaŭ en karceroj kaj koncentrejoj. Preskaŭ ĉiuj kroataj judoj-esperantistoj estis mortigitaj. Kelkaj esperantistoj suferis dum la komunista reĝimo, kaj kelkaj pereis en la Patrolanda milito post la disfalo de la eksa Jugoslavio. Tra tiuj centoj da biografioj klare aperas la bunta mozaiko de diversflanka aktiveco de niaj esperantistoj en la societa vivo de multaj Esperanto-societoj, ilia agado en la kampo de literaturo kaj arto, kaj ilia kompetenta organiza laboro ĉe pluraj naciaj kongresoj kaj ĉe du sukcesplenaj Universalaj Kongresoj okazintaj en Zagreb en 1953 kaj 2001.

La lingvaĵo de la verko estas bona kaj senripoĉa, tipa ĵurnalista stilo. Mi trovis nur naŭ preserarojn. Pri kelkaj eraroj kaj malĝustaĵoj mi deziras atentigi: Ferri Stijepo ne vizitis "la 2-an UK en Vieno", ĉar ĝi tie ne okazis. Ferenčić Ante ne povis esperantistiĝi "kiel 14-jarulo en la Zagreba Esperanto-societo "Bude Borjan", ĉar tiam ĝi ankoraŭ ne ekistis. S-ro Pleše ne povis viziti "la 6-an UK en Washington en 1919", ĉar la Universala Kongreso en Vaŝingtono okazis en la jaro 1910. S-ro Radić Tomislav ne povis redakti Esperanto-elsendojn de Radio-Zagreb "ĝis 1993", ĉar la direktoro de la Kroata Radio-Televizio nuligis tiujn elsendojn somere de la jaro 1992. Profesoro Večerina Ivan ne povis "instrui Esperanton en la Beograda Universitato en 1919", ĉar tiam li estis 13-jarulo. D-ro Maruzzi ne "akiris en 1922 ĉe la Komerca fakultato docentecon pri Esperanto", sed li akiris ĝin la 17-an de julio 1926 en la Ekonomik-Komerca Altlernejo en Zagreb. Prof. Ivo Lapenna ne estis "membro-korespondanto" de Jugoslavia Akademio de Scienco kaj Artoj, sed li estis ĝia membro-kunlaboranto. Emilija Lapenna mortis ne en 1984 sed en 1994.

La biografiojn akompanas tre multaj sufiĉe bonaj fotografajoj. Mi tutkore rekomendas tiun vere valoran verkon al ĉiuj kroataj esperantistoj. Ĝi porĉiame atestos pri la multnombreco, altkvalito kaj fervoro de kroataj esperantistoj. Tiu ĉi leksikono apartenas al la verkoj kiuj estas neniam kompete finitaj, kaj prave diras la aŭtoro Josip Pleadin ke ĝi "certe estas korektenda kaj pliperfektigenda". Do, nepre aĉetu kaj legu ĝin!

Ivo Borovečki

kontroladon, helpis 42 helpantoj kaj 26 familianoj, parencoj kaj konatoj de diversepokaj aktivuloj de la enlanda Esperanto-Movado.

Mi devas sincere konfesi (post dufoja legado de la verko), ke jam delonge mi ne tralegis tiel enhavoplenan kaj ekscitovekan libron kiu prezentas siaspecan intiman, personan historion ne nur de unuopaj esperantistoj, sed, fakte, de la tuta, preskaŭ centjara historio de la Esperanto-Movado en Kroatio.


En la libro troviĝas 876 biografioj de kroataj esperantistoj ekde la fino de la 19-a jarcento ĝis la komenco de la 21-a jarcento. Krome, tie ĉi troviĝas biografioj de pluraj eksterlandaj esperantistoj vivintaj dum certa tempo en Kroatio. En la enkondukaj vortoj la aŭtoro atentigas ke li trovis kromajn 200 nomojn de iamaj esperantistoj pri kiuj li ne povis trovi pliajn informojn, kaj ke kelkaj iamaj aktivuloj rifuzis publikigi siajn biografiojn.

Necesas menciigi ke la bazo de tiu ĉi verko estas la libro de nia mondkonata esperantologo Marinko Gjiĵvoje: "Leksikono de aktivaj jugoslaviaj esperantistoj", kiun post la morto de la aŭtoro finredaktis s-anino Lucija Borčić kaj kiu aperis en 1985.

Legante la libron oni povas konstati ke mankis fiksitaj, klaraj kriterioj ĉe la verkado de tiuj biografioj. La biografioj tre malsamas rilate la longecon kaj priskribon de profesia kaj esperantista agadoj. Ĉe pluraj himoj oni tro detale parolas pri ilia profesia vivo, kaj, aliflanke, oni tro detale priskribas multflankan esperantistan aktivecon de multaj homoj. Mankas la ekvilibro en la prezento de profesia kaj esperantista aktiveco. La biografioj havas amplekson de unu frazo (ekz. ĉe Ficko Ilona, lattinger Angela kaj Lovrić Vinka) ĝis pli ol tri paĝoj ĉe Lapenna Ivo, kies biografion kompilis lia vidvino Birthe Lapenna.

La verko montras tutan gamon de plej diversaj homoj kiuj en la interspaco de cent jaroj multflanke aktivis en la

HONORE AL ALDO DE'GIORGI



En Italio en januaro 2003 forpasis poeto Aldo de' Giorgi (1924). Ni omaĝas al li per la poemo el lia poemaro "Pretertempe".

LA PROTAGONISTO

La Morto
kun robo sceneja
falĉas
dise, mise, ope,
foje balete
foje apokalipsĉevalgalope.
Drame aŭ kabarete,
kun krako aŭ kun mildo,
ĉu ne, ĉiuokaze,
koreografia
loga bildo?

PREZIDENTO STJEPAN MESIĆ AKCEPTIS PROTEKTANTECON DE LA 6A KONGRESO DE KROATAJ ESPERANTISTOJ

Kadre de la Kongreso estos celebra la 95-a jubileo de Esperanto en Zagrebo. La urba estraro same akceptis protektecon de la aranĝo. Dum la kongreso ni lanĉos du novajn librojn, klopodos plibonigi nian delegitan reton kaj prezentos la novan ejon al la membroj.

Juna rusa pianisto Andrej Korobejnikov koncertos kadre de la kongreso la 31-an de majo 2003 en Glazbeni zavod. Li havas je sia repertuaro, speciale por la kroata turneo la sonaton de L. van Beethoven kiun la komponisto en la komenca fazo de sia kreado dediĉis al la kroata grafino

"KROATAJ POETINOJ DE LA 20-A JARCENTO" ETA ANTOLOGIO

Vesna Krmpotić:

KVARTETO SOLO

(Kvartet solo)

AMI SIGNIFAS HAVI ĈION

Ami signifas havi ĉion,
krom motivon por la amo.
Ĉion alian per amo motivi.

Senmotiveco de la Dio
kaj lia motiveco en ĉio
estas leg' de l' amo.

AMO, AMATA

La koro prokrastas pulsadon ĉar troa balasto,
kaj iras rendevuen kun la amata
miregante kiel facilas ne bati.

La amo, amata, ne okazas inter du.
La amo okazas inter unu
kiu kredas esti duopo.

Belegas esti enamiĝinta,
vi diras.
Belegas brili.
Ebriiĝinta esti.

Ĉu iam vi pripensis la nepripenseblan:
esti vino?

Ne nur esti de vino absorbita -
sed esti vino de absorbo?

Tradukis: Lucija Borčić

Barbara Ana Keglević. Li estis ŝia pianinstruisto dum ses vintroj en Vieno.

Krom en Zagrebo Korobejnikov turneos tra Kroatio: en elementa lernejo Virje, konata pro sia kulturamo, li koncertos ankaŭ en la fama Muziklernejo de Varaždín. En departemento Krapinsko-zagorska li gastos okaze de la Tago de komunumo Donja Stubica per koncerto en kastelo Stubički Golubovec.

KROATAJ POETINOJ DE LA 20-A JARCENTO



135 paĝoj
Prezo: 50,00 kunaoj
triona rabato ekde tri ekzempleroj

Mendu ĉe:
Kroata Esperanto-Ligo
Kneza Mislava 11/III, Zagreb
telefone: (385 1) 4617550

Novaj Esperantaj libroj el Kroatio

Davor Klobučar **ESPERANTSKI MOZAIK**

320 paĝoj
Prezo: 120,00 kunaoj
triona rabato ekde tri ekzempleroj

Mendu ĉe:
Esperanto-societo "Liberiga stelo"
Osijek,
telefone: 098/338-242
aŭ
GRAFOKOM, Đurđevac, p.p. 96
telefone: 098/248-574

